NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com

TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

SEPTEMBRO/OKTOBRO 2005 **Nro. 61 (4/05)**



La kvin bilbaoanoj partoprenintaj la Universalan Kongreson de Vilno (Litovio) pozas kun bulgara amikino Antoaneta Nikolaeva, kiu ĝentile atendis ilin ĉe la flughaveno portanta E-flagon.

BILBAOANOJ EN LA SOMERAJ KONGRESOJ.

Hispana Kongreso (07/10 Jul. 2005).

Niaj samklubanoj Eduardo Larrouy, Iciar Arteche kaj Jesús M. García veturis al Alcalá de Henares (Madrido) por partopreni la kongreson de Hispana E-Federacio.

Oni elektis tiun urbon nehazarde, sed pro la fakto ke la nuna jaro estis la 400a datreveno de la publikigo de "Don Kiĥoto" kaj Alcalá estas la naskiĝurbo de Miguel de Cervantes.

Ekster la kutimaj programeroj, oni devas substreki **la elekton de nova HEF-estraro**. Antaŭ ol la Ĝenerala Asembleo estis diversflankaj kontaktoj de la ĝistiamaj estraranoj kun eblaj kandidatoj, sed multaj rifuzis pro personaj kialoj. Fine oni sukcesis kunigi skipon, kiu gvidos nian asocion sub la helpoferto farita de la foririntaj estraranoj. Tiel, la nova HEF-estraro restas jene:

Prezidanto: Augusto Casquero (Valencio)
Vic-Prezidantino: Lupe Sanz (Madrido)
Sekretariino: Carmen Suárez (Madrido)
Kasisto: Pedro A. Garrote (Valjadolido)
Estraranoj: Luis Hernández (Valjadolido) kaj J.Mª Galofré (Sabadell)
Redaktoro de Boletín: Manolo Pancorbo (Madrido).

Universala Kongreso (23/30 Jul. 2005).

Ĉi jare, la Universala Kongreso (UK) de UEA (Universala E-Asocio) okazis en Vilno, ĉefurbo de Litovio. Tien veturis 5 bilbaoanoj, nome, José Luis Bringas, Jesús M. García, Marta Gracián, Teodoro Ibáñez kaj Eduardo Larrouy.

Post sufiĉe komforta flugo kun halto en Frankfurto, ili alvenis al malgranda ĉefurbo de malgranda lando, kie certe estas pli da arboj ol da loĝantoj; fakte, ekde la ĉielo, la lando aspektis kvazaŭ granda arbaro kun kelkaj urboj dise.

Krom partopreni la kutimajn programerojn, ili havis la okazon saluti multajn konatulojn, kiuj vizitis nin okaze de la 6a eŭropa kongreso, kiu okazis pasintjare en Bilbao.

Bedaŭrinde, tiel kiel jam komencas esti kutimo, malmulte da hispanoj partoprenis la kongreson (nur 13); tio signifas ke la plejparto veturis el Bilbao.

Bilbaoano estas nova komitatano de UEA.

Dum la pasinta Ĝenerala Asembleo de HEF en Alcalá de Henares, oni nomumis, al **Jesús Miguel García Iturrioz**, novan reprezentanton de Hispanio en la A-Komitato de UEA. Li anstataŭas al Augusto Casquero, nova Prezidanto de HEF.

NOVA LIBRO JE LA FINO DE OKTOBRO

"El hombre que desafió a Babel"

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS DECEMBRO, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton: po 23 eŭroj vi ricevos "El hombre que desafió a Babel" kaj "Nuevo Método de Esperanto"; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio. Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

(El "Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Sep/Okt 2005)

PAGO DE CUOTAS 2005.

A todos aquéllos que aun no habéis hecho el pago de la cuota de socio del peresente año, os rogamos que lo hagáis cuanto antes, pues ya nos encontramos en el último trimestre de 2005.

El númro de cuenta en la BBK lo tenéis en la primera página de este boletín, aunque también puede hacerse el pago en el mismo Grupo.

Para recordarte si has pagado, o no, la cuota, **en caso de impago, a la izquierda de estas líneas veras un aspa de color rojo**.

LOTERÍA DE NAVIDAD.

Muy pronto estará lista la lotería de Navidad de este año 2005. Como de costumbre, toda la ayuda que tengamos para su venta será bien recibida. El precio de las participaciones será el habitual: 3,00 euros, de los que se juegan 2,50 de lotería y se deja un pequeño donativo de 0,50 euros para el Grupo.

Después de muchos años sin que nos tocara el más mínimo premio, el año pasado recibimos, al menos el reintegro de lo jugado. Ahora que "estamos en racha", seguro que este año nos toca otra vez algún premio.



Universala Kongreso en Vilno (Litovio).

La sabaton 30an de julio, post la fermo de la kongreso, antaŭ la kongresejo kuniĝis diversaj grupoj de geamikoj por adiaŭi unu la aliajn. Inter tiuj grupoj, jen tiu ĉi de hispanoj al kiu aldoniĝis kelkaj eksterlandaninoj.

De maldekstre dekstren: Vija Jansone (Latvio), Jaime (Valencio), Teodoro Ibáñez (Bilbao), Eduardo Larrouy (Bilbao), Antoaneta Nikolaeva (Bulgario), Grazyna (Pollando), Jesús M. García (Bilbao), Marta Gracián (Bilbao), José Luis Bringas (Bilbao), Angelita Sanz (Madrido) kaj Augusto casquero (Valencio).

Ĝis la venonta jaro en Florenco (Italio) !





Eduardo Larrouy, Iciar Arteche kaj Jesús M. García gaje kaj festeme pozas, kun la portugala amiko Paulo Branco, dum la Hispana Kongreso en Alcalá de Henares.

Malgorzata Handzlik renkontis pintan EU-burokraton

Unuafoje en la historio de la Eŭropa Unio, reprezentanto de esperantistoj renkontiĝis kun pinta reprezentanto de la Eŭropa Komisiono. Dum sia rendevuo kun Ján Figel, Malgorzata Handzlik rakontis ke Esperanto povus faciligi la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj, kaj postulis, ke Esperanto ricevu egalajn rajtojn kun aliaj lingvoj en la eduk-sistemoj en la landoj de la Eŭropa Unio.

Raportis: Kalle KniivilÃ¤ kalle@esperanto.se. Prenita el ret agentejo "NUN". 08/07/2005.

Nova Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

Dum la 64a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta de la 7a ĝis la 10a de julio en Alcalá de Henares (Madrid) estis elektita Augusto Casquero, nova Prezidanto de H.E.F. Sro Casquero, aktiva esperantisto, organizis plurajn Hispanajn Kongresojn de Esperanto, ĉefe en Madrido kaj en Valencio kaj estis la ĉefmotoro de la U. K. okazinta en Valencio en 1993.

Raportis: Luis Hernández <LUISHERNANDEZG@usuarios.retecal.es>. Prenita el retagentejo "NUN". 13/07/2005.

Internacia Televido jam havas sian propran retejon!

La administracio de Ĝangalo kaj la teamo de Projekto ITV disponigas al la publiko la retejon de Internacia Televido, la unua interreta televidkanalo tute en Esperanto. En aparta sekcio de la retejo, alirebla nuntempe nur al teamo de la projekto, la testoj kun la elsendflua sistemo jam komenciĝis. Pliajn informojn vi trovos en la portalo Ĝangalo.

Raportis: Gxangalo-redakcio <gxan@gxangalo.com>. Prenita el retagentejo "NUN". 14/07/2005.

ASEMBLEO DE EEU EN VILNO

La 26-an de julio 2005 okazis kadre de UK en Vilno Asemblea kunveno de Europa Esperanto-Unio. Temis pri unua oficiala asembleo, ĉar EEU estas leĝe registrita asocio ekde majo 2005 en Bruselo. Ĉeestis asembleanoj el 18 landoj kaj pli ol 40 gastoj kaj interesitoj chefe el Eŭropaj landoj. La nuna ekonomia situacio de EEU estas kontentiga kaj la planitaj kostoj havas certigitajn rimedojn. La asembleo akceptis laborplanojn por 2005 kaj 2006 kaj elektis novan estraron: Sean O Riain, prezidanto, Flory Witdoeckt, vicprezidantino, Zlatko Tišljar, sekretario, membroj J. Handzlik kaj P. Balaz.

Raportis: Zlatko Tisxljar <zlatko.tisljar@siol.net>. Prenita el retagentejo "NUN". 14/07/2005.

(Miriga) artikolo en "La nueva España", ĵurnalo de Oviedo

"Discurso sobre las cosas inútiles". JOSÉ MANUEL BALBUENA.

En artikolo pri la astura lingvo, li inkludas jenan "perlon": "Discutir sobre la utilidad o no de un idioma es, cómo no, relativo. Hace muchos años, aplicando esa visión pragmática de la vida, surgió el que estaba llamado a ser el idioma universal que desplazaría incluso al inglés: el **esperanto**. Según sus creadores, la mezcla de vocablos y reglas gramaticales fáciles haría del mismo un lenguaje de uso común en poco tiempo. Sin embargo, hoy ya nadie se acuerda de él. Desapareció porque junto a una lengua debe de ir también una cultura. Nadie había escrito o contado nada en esperanto, nadie lo había transmitido de generación en generación, nadie lo consideraba como algo familiar o cercano si no más bien como un simple engendro de laboratorio.

Raportis: Toño del Barrio. Madrido. 17/08/2005

Nombro da esperanto-parolantoj.

Okaze de ĵurnala artikolo kie oni skribis pri "unu miliono da esperanto-parolantoj", nombro kiun kelkaj homoj konsideras troiga, mi prezentas jenajn kalkulojn, kaj mi volas koni viajn opiniojn pri ili:

1) La nombro de patroprenantoj en Universala Kongreso estas proksimume 2.000 esperanto-uzantoj, kaj mi opinias ke por ĉiu kongresanto ekzistas multaj (pli ol 500) esperanto-uzantoj kiuj ne partoprenas Universalan Kongreson, kaj jam 2000 x 500 = 1.000.000.
2) La nombro de individuaj membroj de UEA estas proksimume 5.000 esperanto-uzantoj, kaj mi opinias ke por ciu membro de UEA ekzistas multaj (pli ol 200) esperanto-uzantoj kiuj ne membras en UEA, kaj jam 200 x 5.000 = 1.000.000. Do, tre verŝajne la vera nombro de esperanto-uzantoj superas unu milionon.

Luis Guillermo RESTREPO RIVAS. Bonaera Gxangalo Redakcio. 18/08/2005

Fajro detruis Esperanto-domon en Berlino

Granda fajro en la subtegmentejo de la Esperanto-domo en Berlino detruis parton de la Germana Esperanto-Arkivo kaj la kunvenejon de esperantistoj, kiuj situis en la subtegmentejo. La cetera parto de la domo estos neloĝebla dum sekigado. La fajro okazis en la nokto inter la 6-a kaj 7-a de septembro. En la monatoj antaŭ la fajro pli ol 10.000 eŭroj estis uzitaj por rekonstruo de la subtegmentejo. Tuj antaŭ la IJK en la subtegmentejo loĝis 12 anoj de internacia laborbrigado.

Raportis: Kalle KniivilÃ¤ <kalle@esperanto.se>. Retagentejo "NUN". 12/09/2005.

NIAJ AKTIVULOJ ...

SANTAMARÍA NEIRA, José (1887-1979)



Naskiĝinta en Deŭsto, kvartalo de Bilbao, la saman jaron ol aperis la unua gramatiko de Esperanto, li laboris kiel bankoficisto; esperantistiĝis en 1905. Li mem diris: *"Aperis en la ĵurnaloj de Bilbao kelkaj artikoloj pri Esperanto. Ili altiris mian atenton kaj tiun de miaj amikoj. Ni decidis, do, lerni ĝin per ni mem, kaj ni trafis nian celon. Tio okazis en la jaro 1905"*. Kaj pri la ĉefa faktoro, kiu instigis lin lerni Esperanton, *"nur la ideo interkonatiĝi kun alilandaj gejunuloj kaj informi min pri ilia vivmaniero, moroj, ideoj, kaj ampleksigi tiel mian mondon.*

Estis unu el la fondintoj de la Grupo Esperantista de Bilbao en 1906. Estrarano en tiu unua komitato, li konstante aktivis en la loka Movado gvidante kursojn aŭ prizorgante la Societan Bibliotekon, malgraŭ ke dum 30 jaroj loĝis for de nia urbo.

Li kunlaboris en la redaktado de "*Bilbao Esperantista*" (1908), kaj precipe de "*Nova Sento*" (1909), verkante artikolojn kaj belajn poemojn, grandparte el ili publikigitaj sub la pseŭdonimo "*Virgilio*". Ankaŭ tradukis la verkojn "*Montosupren*", rakonto de Enrique Mesa, kaj "*Infana Ludo*", teatraĵeto de Jacinto Benavente. Homo tre modesta kaj klera, li estis unu el la plej firmaj batalantoj por Esperanto en Bilbao; Laŭreata en la Floraj Ludoj de la Kvina Universala Kongreso de Barcelono.

Por fini, jen liaj opinioj pri tio, kion oni devus fari por plivigligi kaj pligrandigi la movadon: *"Altiri la intelektuloin, kiuj, malfeliĉe, malestimas pro ignorado, la genian kreitaĵon de nia lingvo. Laŭ mia opinio, la movado esperantista povas esti komparata kun la unuaj tempoj de la kristanismo: komence nur humilaj personoj subtenis kaj sinoferis por la ideo".*

(*El "Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo" de A. Marco Botella. Zaragoza 1987 kaj el "Boletín". Mar/Apr 1966*)

2006 !!!

LA E-GRUPO DE BILBAO 100-JARIĜOS